



Svisa Esperanto-Societo

Gazetara Komuniko

2011-05-11

FESTOTAGO HONORE KAJ OMAĜE AL CLAUDE GACOND 80-jara



**sabate la 27an de aŭgusto 2011
en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds (CDELI kaj aŭlo)
Progrès 33, 2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando**

Claude Gacond estas fama svisa esperantisto. Instruisto, pedagogo, li fondis la arkivejon 'Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia' (CDELI) en la jaro 1961. Poste li fondis Kulturano Centron Esperantistan (KCE) en 1968 en La Sagne, Ekde 1974 tiu Centro staras en La Chaux-de-Fonds. Duontempe li instruis, duontempe li agadis por KCE kaj CDELI.

Ekde 1994 li dediĉas siajn fortojn al [CDELI](#) en la Urba Biblioteko. Inter 1962 kaj 1992 li estis parolisto ĉe la esperantofako de [Svisa Radio Internacia](#) en Berno. Li estas redaktoro de [SESinformas](#), la bulteno de Svisa Esperanto-Societo.

Claude Gacond estas honora membro de UEA, de SES kaj de ILEI.

Festolibro aperos kaj estos solene transdonata al Claude dum la festotago.



Svisa Esperanto-Societo

pf 9, 2416 Les Brenets

ses@esperanto.ch

Programo de la festotago :

Akcepto en CDELI-salono ekde 9h30

Komenco de la solena festotago en la aŭlo : 10h30

Aperitivo : 11h30 kun salutvortoj diversaj

Tagmanĝo en la restoracio Citérama : 13h00

Solena festotago, dua parto, en la aŭlo : 15h00

Fino de la ceremonio: 16h30

Plua renkonteblo en CDELI-salono ĝis la 17h30

Por mendi la festolibron, oni rilatu kun la eldonejo Iltis per jena adreso:
editioniltis@aol.com

Por partopreni, alparoli la festantojn, kanti aŭ deklami, partopreni la tagmanĝon (prezo ĉirkaŭ CHF 30), oni anoncu sin al Mireille Grosjean
mirejo.mireille@gmail.com, telefone : +41 79 69 709 66.

Por restadi antaŭe aŭ poste, tranokti kaj partopreni la postfestan programon, oni anoncu sin al Claude Gacond, rete : gacond@bluewin.ch
telefono hejme : +41 32 926 52 32, CDELI : +41 32 967 68 42

Postfesta programo: *Amika renkonto, kiu ebligas reciprokan konatiĝon.*

Tiucele Claude elektis agrablan kunvenejon en la hotelo Von Bergen situanta en La Sagne, vilaĝo najbara al La Chaux-de-Fonds. Detaloj troveblas sur la retejo www.esperanto-gacond.ch - por sinanonci : retmesaĝu al gacond@bluewin.ch

Claude antaŭvidas por la sabato postfestan manĝon kaj amikan vesperon. Kaj dimanĉe, inter la maten- kaj tag-manĝoj, eble en ĝardeno, okazos interŝanĝaj kontaktoj. Posttagmeze, kiuj ne tuj forvojaĝos, tiuj intimiĝos promene kun siberia pejzaĝo torfeja antaŭ ol frandi fonduon aŭ kamparanan teleron. Vespere: kontakto kun iama lernantino malkovrigos ŝian manieron spione filmi birdojn. Kaj lunde, post tiu kamparana aventuro, Claude estos en CDELI por vizitantoj de tiu dokumentejo. Eblas akiri brokantaĵojn librajn kaj revuajn.

Ni petas vin aperigi ĉi tiun komunikon en la revuo(j), kiu(j)n vi prizorgas. Bonvolu fari tion antaŭ la somera paŭzo. Kun elkoraj antaŭdankoj, Mirejo Grosjean, kunprezidanto de SES. Les Brenets, 2011-05-11.